

Kubo sub Díaz-Canel en 2018 – malfacile diri kion li povos atingi por sia popolo

Politika bilanco de la ĝisnuna regado de prezidento de Miguel Díaz-Canel post la abdiko de Raúl Castro

Originale verkita en Esperanto de Andreas Künzli

Ekde aprilo 2018 Kubo havas novan prezidenton: Kun Miguel Díaz-Canel Bermúdez Kubo estas unuafoje regata de ŝtatestro, kiu ne portas la nomon de Castro. Sed tio tute ne signifas, ke en Kubo la politiko esence ŝanĝiĝis per nova orientiĝo en la interna kaj ekstera sferoj. Daŭrigi la revolucion jes aŭ ne ne estas debatite, sed Havano ja deziras almenaŭ adapti sian politikon al la novaj realaĵoj. Lige kun tiu strebado okazas revizio de la konstitucio, kiu antaŭvidas la legaligon de la privata posedo kaj renovigon de la instituciaj organoj. Tio signifas, ke la reformpolitiko ja estas daŭrigata, tamen nur paŝon post paŝo sen urĝo kaj hektiko kaj – plej esence – sen rezigni pri la socialismo. Decida por la estonteco de la lando estas, ĉu la nova prezidanto povas atingi pli grandan sendependecon de la Castro-dinastio, kiu malantaŭ la kulisoj daŭre tiras la politikajn fadenojn.

Do, la mito pri la malnovaj revoluciuloj iom post iom apartenas al la historio. La generacia ŝanĝo estas evidenta kaj estis neevitebla, kaj la elekto de Díaz-Canel signifas, ke oni decidis fini la epokon de la Castro-dinastio. Tio certe estas sensacia novaĵo. Sed kial? La kaŭzoj por tiu decido ne estas tute klaraj, ĉar ekzistas diversaj infanoj de Fidel Castro, kiujn oni evidente nun ne volis konsideri kiel posteulojn de la Castro-ikonoj Fidel kaj Raúl. Sed ni ne forgesu, ke Alejandro Castro Espín, la filo de Raúl, praktike gvidas la sekurecan servon de Kubo, al kiu Díaz-Canel evidente ne havas rilaton. Kiajn sekvojn tiu konstelacio por Kuba havas estas malfacile diri. En la nova konstitucio oni intencas limigi la tempon de la regado de unuopaj personoj. Lige kun la fino de la personkulto, kiu en Kubo estis praktikata dum la tuta longa Castro-periodo, oni intencas reenkonduki ankaŭ la oficon de la ĉefministro, kiun Fidel abolis en 1976.

Do, Kubo ŝajne alvenis en la postkastrisma tempo, kvankam Raúl daŭre funkcias kiel ĉefo de la Komunisma Partio de Kubo kaj estas ĉefkomdandisto de la kuba armeo, kiu ludas la gravan rolon de ekonomia faktoro. Tiuj pozicioj donas al li la okazon plu influi kaj kontroli la politikon de Kubo. Per la elektita strategio oni evidente volas eviti, ke en Kubo aperas diversaj oligarkoj kiel en orienta Eŭropo post la falo de la komunismo. Tiuj oligarkoj povus komplete fajfi pri la socialismo kaj dividi inter si la kuban ekonomion. Dum la vivotempo de Raúl dependos, kiuj politikaj grupoj povas establiĝi en Kubo, ĉar Castro ne libervole rezignos pri la potenco de la kuba „revolucio“, kiun li volas savi ankaŭ en la estonteco. La politika retoriko de Castro, ekzemple rilate la usonan embargon, kiun li konsideras ĉefkulpa por la ekonomiaj malfacilaĵoj de la kariba insulo, restis esence la sama. Krom tio, li emfazis la gravecon de la solidareco inter la aliancataj ŝtatoj, precipe Venezuelo. Do, Díaz-Canel unue veturis al Karakaso, ĉar la venezuela ŝtatestro Nicolás Maduro post sia enoficiĝo ankaŭ unue vizitis Havanon. Sed kiel longe Venezuelo taŭgas kiel partnero neniu scias, ĉar ankaŭ la regado de Maduro certe iam finiĝos.

Se oni rigardas la liston de la membroj de la kuba registaro, oni konstatas, ke Díaz-Canel plu regadas kun la samaj homoj de Raúl Castro. Proprajn homojn li ne sukcesis alporti, do la grupo de Castro daŭre kontrolas almenaŭ la centrajn ministeriojn de la internaj kaj eksteraj aferoj kaj de la defendo. La lojalecojn ene de tiu grupo Díaz-Canel probable ne povas ignori, se li ne volas esti forpuĉita. La demando nun estas, ĉu Díaz-Canel fariĝos pura marioneto de tiu grupo aŭ ĉu li sukcesos emancipiĝi de ĝi.

Dum Raúl Castro do ankoraŭ ‘aŭspicias’ la kuban politikon, lia posteulo ricevis kelkajn gravajn taskojn por solvi: la reformadon de la konstitucio, la reorganizado de la ekonomio kaj la kunigon de ambaŭ kubaj monunuoj, kiuj dividas la posedantojn de usonaj dolaroj disde la ceteraj civitanoj. Ŝajnas, ke precipe la ĉi-lastata reformo promesas multajn konfliktojn, tiel ke oni eĉ ne tuŝis ĝin ĝis nun. Ĉiuj tiuj reformoj devas okazi sub la signo de la „daŭripova socialismo“. Tio signifas inter alie, ke la komunisma partio ne rezignos pri siaj historiaj „atingoj“ kaj sia gvida rolo en la socio. La nova prezidemto devas

zorgi pri tio, ke misuzoj kaj devojiĝoj sur tiu kampo ne okazu. Resume: La nova prezidento devas okupiĝi pri (je ne malgravaj) teknikaj detaloj de la ŝtata potenco, dum tiun potencon okupas aliaj.

Unu el la centraj projektoj de la kuba registaro estas ankaŭ la konstruado de la privata sektoro. Ekde 2010 kubaj civitanoj rajtas memstare labori kadre de privataj kooperativoj aŭ malgrandaj entreprenoj, kiuj „funkcias laŭ propra kalkulo“. La ege malforta landa ekonomio, en kiu ĉiutagaj varoj draste mankas, nepre bezonis iun puŝon. La promesoj plialtigi la vivnivelon la kuba registaro tamen ne povis plenumi. Nutraĵoj kaj medikamentoj devas esti importitaj en granda kvanto. Dank'al la privata sektoro la gastronomio en Havano konsiderinde plibonigis kompare kun la tempo de antaŭ 20, 30 jaroj,¹ sed tio estas tutmonda tendenco.

Multaj laborpostenoj en neprofitdonaj ŝtataj entreprenoj kaj organizaĵoj estis forstrekitaj. Ankaŭ la kvoto de la memstara laboro estis plenumita nur duone. Laŭ la statistiko, en 2016 nur 29 procentoj de la laboristoj aktivis en la privata sektoro. Kvankam tio estas kresko je 13 procentoj kompare kun la jaro 2010, la dezirata celo de altigo je 40 procentoj ne povis esti atingita. Ankaŭ la espero, ke la larĝigita privata sektoro kreos pli da laborlokoj, restis vana. La malneta enlanda produkto kreskis nur je ĉirkaŭ 2 anstataŭ 5 procentoj kiel celate.

Kontraŭ la intenco de la liberaligo, en julio 2018 la registaro enkondukis novajn leĝojn, kiuj eĉ pli malfaciligas la aktivecojn en la privatekonomia sektoro. La kontrolistoj povas pli rapide puni homojn, forpreni laborlicencojn aŭ konfiski posedaĵojn pro „lezado de la kuba socio“ kaj simile. Tiu praktiko memorigas malnovajn komunismajn tempojn. La ŝtataj organoj do ricevis pli grandajn eblecojn interveni per arbitraj decidoj kaj agoj, kiuj povas servi al la protektado de la ŝtataj firmaoj. Per tio oni evitas la konkurencon en la unuopaj branĉoj, tute laŭ malnova kartela monopolisma maniero. Tiuj reguligoj koncernas ekzemple la turismon, gastronomion kaj trafikon aŭ transportadon. Ŝajnas, ke la komunistoj timas, ke la privatuloj povus aparte rapide akiri tiujn sektorojn, pri kiuj la komunistoj povus perdi la kontrolon. Tio estas fatala signo al la adreso de eksterlandaj firmaoj, kiuj volas investi en Kubo, ekzemple kadre de la speciala ekonomia zono „Mariel“ situanta 45 kilometrojn okcidente de Havano, kiu estas konsiderata kiel ŝlosilo por la malfermiĝo de la kuba ekonomio. Eĉ la ortodoksa partia organo *Granma* raportis pri ĝi.² Kvankam la kuba registaro revis pri 7 miliardoj da usonaj dolaroj, en 2017 nur 2 miliardoj estis investitaj. Sekve, mankas la urĝe bezonataj eksterlandaj devizoj. Atendeble ankaŭ la turismo malpli prosperos ol dezirate. Pro la nova konflikto kun Usono kaj la malfavoraj prezoj la antaŭvidita kvanto de 5 milionoj da eksterlandaj turistoj verŝajne eĉ ne estos atingita en 2018.

Kvankam Kubo promesas medicinan provizadon por ĉiuj, en la realeco bona medicina provizado ne estas garantiata en ĉiuj malsanulejoj. Por kuraci seriozajn malsanojn aŭ trakti gravan akcidenton necesas vojaĝi al eksterlando. Tiuj avertoj validas precipe por eksterlandaj turistoj, sed ili donas imagon pri la situacio en averaĝaj malsanulejoj de Kubo, kiujn devas utiligi propraj civitanoj, kiuj ne posedas la necesan monon. En Kubo konstante mankas gravaj medikamentoj, kiuj devas esti importitaj kontraŭ alta pago, kaj la higieno ofte estas katastrofa. Multaj kubaj kuracistoj forlasis la landon. Multaj virinoj abortas. Ke la kuba medicina sansektoro baziĝas sur duaklasa sistemo, ne estas okcidenta propagando, sed malnova vero. La kondiĉoj en kubaj malsanulejoj eĉ ne plu taŭgas por komparo kun cetera Latinameriko. Dum riĉuloj kaj eksterlandanoj eble povas ricevi bonan medicinan helpon en iuj specialaj (kaj multekostaj) klinikoj, precipe malbonaj estas la kondiĉoj en kubaj malliberejoj, kie eĉ la baza nutrado estas nesufiĉa.

Koncerne la homajn rajtojn, ankaŭ la situacio en la jaroj 2016/17 ne esence plibonigis en Kubo, ĉar senkonsidere al la pli granda politika malfermiteco la rajtoj je publika esprimado de la libera opinio, je libera laŭdezira kunvenado kaj persona migrado daŭre estas forte limigataj. Civilsociaj kaj opoziciaj grupoj daŭre plendas pri kreskinta nombro de politike motivataj arestadoj kaj ĉikanoj kontraŭ kritikantoj de la registaro. Inter januaro kaj novembro 2016 la „Kuba Komisiono por homaj rajtoj“ registris averaĝe po 862 arbitrajn arestojn por ĉiu monato, kio signifis kreskon kompare kun la antaŭa jaro. Sendependaj observantoj ne rajtis viziti kubajn malliberejojn. Kubo estas la sola ŝtato de la amerika kontinento, kiu

¹ Vd. [https://www.tripadvisor.de/Restaurants-g147271-Havana Ciudad de la Habana Province Cuba.html](https://www.tripadvisor.de/Restaurants-g147271-Havana_Ciudad_de_la_Habana_Province_Cuba.html) (kiu indikas 846 restoraciojn en Havano).

² Vd. <https://www.welt.de/regionales/hamburg/article149541086/Sonderzone-ist-der-Schluesel-fuer-Kubas-Oeffnung.html>, <https://amerika21.de/2015/11/136313/sonderzone-mariel-unternehmen>, <http://de.granma.cu/cuba/2016-11-02/sonderzone-mariel-in-drei-jahren-gewachsen>.

malpermesas al „Amnestio Internacia“ eniri la landon. Inter oktobro 2015 kaj julio 2016 pli ol 46 mil kubanoj forvojaĝis al Usono. Tio estis malgranda kresko kompare kun la jaro 2015, sed signifis duobliĝon kompare kun 2014. Krom tio, Havano ne ratifis gravajn internaciajn homrajtajn konvenciojn, kiuj estis subskribitaj de Kubo antaŭ multaj jaroj. Kvankam pli kaj pli alirebla, la interreto estis krude cenzurata kaj ĝia enhavo filtrata de la registaro por limigi la aliron al la liberaj informado kaj komunikado. Nur unu kvarono de la popolo havis aliron al la interreto kaj nur 5 procentojn disponis pri ĝi en la propra loĝejo. La kostoj por la utiligo de la interreto estas sufiĉe altaj. La amaskomunikiloj estas kontrolataj de la registaro, privata telefonad povas esti subaŭskultata de la polico kaj justico. La traktado de la akuzitoj dum juraj procesoj estas arbitraj kaj ne konformas al internaciaj normoj. Ankaŭ la laborjuro ne estas korekte aplikata. Kvankam la kubanoj povas pli facile vojaĝi eksterlanden, ekzistas limigoj. En la „Internacia indekso pri demokratio“ Kubo okupis la malbonan 131an lokon de entute 176 landoj. En 2017 Kuba falis sur la senesperan 173an pozicion de la „Internacia Indekso pri gazetara libereco“, kvankam antaŭ kelkaj jaroj ĝi ankoraŭ okupis la iom pli favoran 167an lokon. Sed ĉi tiuj ciferoj respegulas la situacion antaŭ la prezidentigo de Díaz-Canel. Atendata do estas drasta kaj rapida pliboniĝo sur tiuj kampoj, se oni volas proklami Kubon kuracita de la lezado de la homaj rajtoj.

Do, ĉiuj esencaj indikiloj en Kubo denove montras malsupren, kun fatalaj sekvoj.

Kio koncernas la novan konstitucion, ĝia reformado tamen estas pli ol kosmetika. 13 iamaj paragrafoj estis komplete forstrekita kaj 113 estis prilaboritaj; nur 11 originaj paragrafoj estas konservataj. La gvida rolo de la komunisma partio, kiu restos la sola politika forto en la lando, kaj la signifo de la socialismo por Kubo restos emfazataj, sed almenaŭ oni volas rezigni pri la „komunisma socio“, kiu restis utopiaĵo. Ĉefa novaĵo do estos, kiel menciite, la reenkonduko de la posteno de la ĉefministro, kiu estos nomita de la ŝtatestro kaj konfirmita de la Nacia Asembleo (parlamento). La ĉefministro prezidos la Konsilion de la ministroj kaj kontrolos la diversajn naciajn kaj lokajn administra-ciajn instituciojn. Laŭ la arkitektoj de la nova konstitucio, la ofico de la ĉefministro devus „fortigi la socialismajn instituciojn“ kaj eviti la koncentradon de la potenco al unu persono kiel en la tempo de Castro.

Alia novaĵo estos, ke la prezidanto de la Ŝtata Konsilio, kiu estas la reganta organo de la Nacia Asembleo inter la parlamentaj kunsidoj, ne plu estu la ŝtatestro, sed la prezidanto de la Nacia Asembleo mem.

Laŭ la opinio de politikaj observantoj, la malavantaĝo de tiu nova konstitucia konstruaĵo, kiu aspektas kiel modelo de kolektiva regado, kiu en Kubo ne havas tradicion, estas, ke la disdivido de la potenco al tri oficoj – do ŝtatestro, ĉefministro kaj parlamentestro – povus krei konkurencon inter ili kaj reciproke bloki ilian laboron, precipe kiam la gvida mano de Raúl iam ne plu ekzistos.

La aliaj gravaj modifoj de la konstitucio koncernas la limigon de la oficaĵaj periodoj kaj aĝlimoj kaj intencas antaŭ ĉio eviti tendencojn de la koncentriĝo de la potenco en la manoj de unu persono. Ŝajnas, ke Kubo volas liberiĝi de sia reputacio kiel diktaturo. Je la fino de la publika diskuta procezo, kiu daŭris de la 13a de aŭgusto ĝis la 15a novembro 2018 kaj dum kiu la kubanoj rajtis fari proponojn, la nova konstitucio devus esti konfirmita kadre de popola referendumo. Sed ŝajnas, ke laŭ malnova komunisma tradicio, la publika kritika debato estis evitata kaj subpremata, la opoziciulo José Daniel Ferrer estis arestita. Do, la tuta konstitucia diskut-procezo estas verŝajne pura farso, per kiu oni celas ŝajnigi demokratian legitimecon. Tamen, Díaz-Canel almenaŭ ŝajnas klopodi vivigi la komunikadon inter la popolo kaj la registaro, precipe tra la kanalo de la interreto (kiun tamen nur relative malmultaj homoj, precipe junaj, utiligas en Kubo). Grandega estas precipe la kultura kaj civila abismo inter urboj kaj la provincoj, kaj reala moderna politika kulturo, kiun ĝis nun monopolis la Castro-reĝimo, estas neekzistanta kaj unue devus esti konstruita. La nova konstitucio eble estas la unua paŝo.

Malgraŭ ĉiuj obstakloj, oni povas deziri al Díaz-Canel sukcesojn, sed la internaciaj observantoj restas skeptikaj. La nova prezidanto de Kubo ŝajnas esti malforta personeco. Aŭ li eble povos ludi gravan rolon nur post la forpaso de Raúl Castro, se li ne estos forbalaita de siaj rivaloj, kiuj probable timas ĉiajn reformojn, kiuj minacas ilian monopolon. Ekskludi la eblon, ke reakciaj fortoj sub la gvido de la Castro-familio povus akapari la povon kaj transformi Kubon al nova diktaturo, oni ne povas. La popolo de Kubo estas malforta, indiferenta, al kutimiĝis al la ĝenerala mizero kaj perdis ĉiun esperon pri pli bona estonteco, ĉar ĝi ne povas influi la politikon de la lando, kiu dum jardekoj estis farata de krimuloj, kiuj nomis sin komunistoj. Kaj ĝia volo povas esti ignorata de la politikistoj, kiuj kutimas subpremi ĉian

ĝermon de kritiko, opozicio kaj disidenteco. Se Kubo ne distanciĝos de la socialismo, ĝi probable restos subevoluinta malmoderna ŝtato kun la risko komplete fiaski, ĉar al Kubo neniu mondpotenco plu helpos, se ĝi daŭre malamike kontraŭstaras la kapitalismajn landojn. Denove bilanci pri Kubo oni do eble povos post pasado de plia jaro.

Andreas Künzli (Svislando), decembro 2018

Utiligitaj fontoj:

<https://www.swp-berlin.org/publikation/kuba-unter-miguel-diaz-canel>

<https://www.eda.admin.ch/eda/de/home/laender-reise-information/kuba/reisehinweise-kuba.html>

https://www.nzz.ch/gesundheitstouristen_in_kuba-1.11231042

<https://www.amnesty.de/jahresbericht/2017/kuba>, <https://www.humanrights.ch/de/service/laenderinfos/kuba>

Antaŭaj artikoloj pri Kubo sur www.planlingvoj.ch:

Fino de la Castro-erao – sed ĝia spirito ankoraŭ ne mortis:

http://www.planlingvoj.ch/Kubo_post_Castro.pdf

Kubo okaze de la morto de Fidel Castro:

http://www.planlingvoj.ch/Castro_biografio2016.pdf

10 jarojn de „Raŭlismo“ en Kubo:

http://www.planlingvoj.ch/Kubo_2016.pdf

Homaj rajtoj en Kubo:

http://www.planlingvoj.ch/Homaj_rajtoj_2014-15.pdf

Politika raporto Kubo 2010:

http://www.planlingvoj.ch/KUBO_Politika_raporto_2010.pdf

Koncerne la solvon de la -ata-/-ita-demando, mi ĝenerale orientiĝis laŭ la germanlingva modelo (war/wird/wurde depende de la tempo, plej parte pasinteco). Sed la tuta problemo estas komplikata/ita per la dimensioj de la adjektiva, tranzitiva kaj verbaspekta demandoj. Do, restas dubo en kelkaj kazoj (devigita/ata, akompanita/ata, miskomprenita/ata, konsiderita/ata, nomita/ata, imagita/ata k.s.), pri kiuj oni povas verve diskuti.

© www.planlingvoj.ch / www.zamenhof.ch, januaro 2019

La (svisa) aŭtoro, nask. en 1962, studis slavistikon, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la Zurika universitato. La studojn li finis en 1992 per licencia verkaĵo pri la historio de Esperanto kaj interlingvistiko en Ruslando kaj Sovetunio kaj estis diplomita per la titolo lic. phil. (M.A.). Esperantisto de 1979. Retestro de www.osteuropa.ch (ankaŭ: www.balkan.ch kaj www.slavistik.ch).

La aŭtoro vizitis Kubon en somero 1990.